



NORMANDA ESPERANTO BULTENO

N° 285

Dépôt à la Bibliothèque Nationale, au Fonds Normand de la Médiathèque de Caen, aux Archives du Calvados et à la Bibliothèque de Cherbourg.

Decembro 2022

Enpaĝigas : Michèle Langeois

Korektas Dominik Cornice

Abono-kotizo : 10 €. « Espéranto – Normandie ». C. C. P. 283.40 H Rouen

Kasistino : Sylvie Caron, 44 rue Gustave Lennier. 76600 Le Havre



**Espérantiste, jardinier, apiculteur
Esperantisto, ĝardenisto, abelbredisto**



P. 1, 2, 3, 5, 10, 12 :

Omaĝoj al Yves, mesaĝoj, fotoj

P.6 : Deux fois sept-texte de Yves, atelier d'écriture

P. 7 et 8 : Fungoj (2) amikoj, malamikoj ?

P. 9 : Sylvie "greeter" en espéranto au Havre

P.10 et 11 : Biciklado (4)

P. 11 : Forpaso de Alain Chalm,
Véronique, hundopromenisto.

Yves ne plu estas !

Hérouville-Espéranto, la Normanda asocio, la esperantista movado estas orfaj.

Nia karega amiko redaktoro de la Normanda Bulteno forpasis la 25an de oktobro.

Ĝis la 14a de oktobro ni kunlaboris. Ni devis nuligi la turisman tagon en Dives sur Mer pro manko de karburajo. Mi ne scias la estontecon de nia bulteno sed tiu bulteno estas verkita parte por Yves, lia familio, liaj geamikoj kaj samideanoj.

Plie, ĝi estas kolore presita dank' al Anne-Marie kiu donacis al klubo Hérouville-Saint-Clair donojn (sen specifa celo, ricevitajn dum la funebra ceremonio).

Al ĉiuj mi deziras plej bonan Jaron en 2023. Fartu bone.

Michèle Langeois, enpaĝigistino.



Teksto legita dum la kremacia ceremonio la 2an de novembro 2022

L'espéranto était une passion pour Yves. C'est dans cette langue que je veux lui rendre hommage.

**Kara, tre kara Ivo,
Estas mi, Gérard, kiu deziras sendi al vi mallongan mesaĝon.
La universala lingvo esperanto estis tiel grava por vi ke,
kompreneble, mi estas devigata esperante alparoli vin, ne france.
De kiam vi malsaniĝis vi mankis al ni.
Kaj nun ? Ni estas orfaj !
Vi ĉiam mankos al ni. Ni, viaj samklubanoj, ni, la normandanoj,
sed ankaŭ la francaj kaj tutmondaj esperantistoj dankas vin por
via senlaca agado koncerne nian lingvon esperanto.
Ni ricevis pli ol sepdek mesaĝojn el multaj landoj kiuj atestas
vian engaĝiĝon.
Ni ne forgesos vian grandan humanecon kaj vian senhaltan
pretecon por helpi la aliajn.
Adiaŭ karega amiko.**

*Cher, très cher Yves,
C'est moi, Gérard, qui souhaite t'envoyer un petit message.
La langue universelle espéranto était tellement importante pour
toi que, je suis bien obligé de te parler dans cette langue, pas en
français.
Dès que tu as été malade tu nous as manqué.
Et maintenant ? Nous sommes orphelins !
Tu nous manqueras toujours. Nous les membres du club
Hérouville Espéranto, nous les espérantistes normands mais
aussi ceux de France et du monde entier, nous te remercions
pour ton inlassable travail en faveur de notre langue espéranto.
Nous avons reçu plus de 70 messages en provenance de
nombreux pays qui témoignent de ton engagement.
Nous n'oublierons ni ta grande humanité ni ta constante
disponibilité pour aider les autres.
Adieu très cher ami.*

Gérard Sénécal (14)

Au nom de tous nos amis espérantistes, au nom de l' Association Normande et de l' Association Hérouville-Espéranto, nous voulons assurer Anne-Marie de toute notre sympathie et la remercier de sa patience et de son accueil aux espérantistes du monde entier.



Place Espéranto
HérouvilleSaint
Clair
Postkongreso de
Lille 2015
Square de l'
Espéranto à
Hérouville-Saint-
Clair.
Avec nos amis
japonais et
russe.



Kanto por Yves

Ĉu ni diferencas?
Jes, ni ne egalas.
Ne la samaj steloj
niajn poŝojn falas.
En balkono mia –
napoj kaj karotoj.
Apud via domo –
floroj en la potoj.
Ĉu sufiĉas tio
por aperu l' penso,
ke abisma estas
nia diferenco?

Vi ne ŝatas, certe,
en la frosto tremi.
Skiojn kaj glitilojn
vintre ŝatas tre mi.
Amas vi la mincajn,
kaj, sendube, pravas.
Amas mi l' diketajn –
sed ĉu tio gravas?
Ĉu ni nur pro tio
restu kun la sento,
ke rilatojn niajn
baras malkonsento?

Mi en zorgoj ŝvitas,
vi vespere lacas.
Nin eĉ kuracistoj
diversaj kuracas.
Kaj el niaj gajnoj
sen ĉiela dono
por deziroj niaj
ofte mankas mono.
Ĉu ni, do, kalkulu,
kara, por bilanco,
ke tro fora estas
inter ni l' distanco?

Ĉu ni diferencas?
Ĉu ni diferencas?
Iu enviulo
tion ĉi elpensas,
por ke ni rigardu
dum la hejma sido
unu la alian
nur per televido.
Do, post interkono
ambaŭ ni trankvilas:
jes, ni diferencas,
tamen – tre similas.
Sept. 1993

Mikaelo Bronjstein(Rusio)

Quelle nouvelle! Ce fut un choc pour moi. Avant ce message, tu m'avais écrit que Yves était malade mais qu'il n'allait pas si mal. Je ne pensais pas qu'il disparaîtrait si rapidement. C'est un immense regret pour moi et mes amis du club.

Maintenant, je cherche comment décrire mon émotion mais je ne trouve rien. Je me remémore seulement les moments heureux que j'ai passés avec Monsieur et Madame Aida, chez Yves et Anne-Marie.

Akemi Ookawa de Yokohama

à Gérard Sénécal, traduit de l'espéranto

Nur kelkajn mesaĝojn inter multajn.....

Mi tre bedaŭras la forpason de Yves. Mi konis lin kiel afablan, helpeman kamaradon. Mi memoras ankoraŭ lian inviton al Herouville dum la eŭropa semajno kaj la belaj renkontoj kaj interesaj diskutoj kiujn ni havis. La unuan fojon mi havis kontakton kun li en la UK en Pekino en 1986....

Bert De Wit Page Facebook de Mikaelo

Yves Nicolas est décédé. Une personne merveilleuse, un merveilleux ami des esperantistes de nombreux pays et y compris de la Russie. Je présente mes condoléances à la famille, aux proches de tous ceux qui l'ont connu ici à Tikhvin. Il est venu à Tikhvin au début des années 90 avec une délégation de résidents d'Herouville. Pendant longtemps Yves a dirigé l'Espéranto Club dans la ville jumelée d'Herouville-Saint-Clair - France. Et toutes ces années, les esperantistes de Tikhvine ont toujours été chaleureusement accueillis par nos amis esperantistes à Herouville.

Василий Барашков Vassili Baratkov
en bas à droite



2011 voyage en Russie.

Henri Masson

Ankaŭ por mi, kaj certe multaj el ni. Yves, faris vere grandan kaj utilan laboron pri turneoj de eksterlandaj esperantistoj en Francio. Ankaŭ nia asocio Espéranto-Vendée profitis el tiu serioza prizorgado. Li organizis sukcesan SAT-Amikaran kongreson en sia urbo Herouville -Saint-Clair en 1993.



Havra Esperantista Grupo

Ivo,
Via familio, viaj parencoj kaj ĉiuj kiuj amis vin ĉeestas apude por diri al vi adiaŭ.
Kun feliĉo ni konatiĝis kun vi kaj parte kuniradis survoje de ia espero. Vi estis lertulo por estigi amikajn rilatojn, katalizi energiojn por la kaŭzoj kiujn ni subtenis kune. Vi ja estis fidela kaj grandanima homo. Via personeco daŭre estos emocidona memoraĵo kaj inspiroplena ekzemplo. Ripozu pace, kara samideano.

Nous étions voisins et amis. Des idées communes ainsi que l'Espéranto nous avaient rapprochés.

J'appréciais beaucoup chez Yves la cohérence de ses idées et de ses actes. Pacifiste et internationaliste il était objecteur de conscience et très impliqué dans le développement de la langue internationale.

Il mettait en pratique l'écologisme dans sa manière de vivre, ses engagements ainsi que par le jardinage et l'apiculture.....**Jean-Pierre Sauvage (14)** dum la ceremonio



Memore pri preskaŭ 40-jara amikeco

Kiam mi vidis la nomon de Jean-Pierre sur la ekraneto de mia poŝtelefono, mi tuj komprenis. Kaj ekploris. Jean-Pierre jam telefonis al mi kelkajn monatojn antaŭe por informi min pri kancero de Yves. Por mi kiu loĝas en Norvegio de pli ol 30 jaroj, Yves estis geografie malproksima amiko, kiun mi ne ĉiujare vidis. Sed li havis specialan rolon en mia vivo, kaj ĉiam restos en mia koro kiel pli aĝa frato kaj amiko samtempe.

Mi iom hazarde trafis al Calvados en 1984, fuĝante el pariza regiono. Mi transloĝiĝis al Bayeux pro laboro, sed neniun konis nek tie, nek en Caen. Sed mi eksciis pri tiu juna esperantisto, kiu ĵus starigis klubon en Hérouville. Mia rilato kun Yves estis amika kaj agraba ekde la unua renkontiĝo. Li tiam laboris en Bayeux, kaj ni ĉiumerkrede kune manĝis en loka krespejo. Post du jaroj mi forlasis Normandion kaj venis al Tromsø, norde de polusa cirklo. Pro mia malskribemo, mi iom post iom perdis kontakton kun amikoj kaj konatoj en Francio. Yves estis escepto, LA escepto! Kaj kiam mi kun familio loĝis unu jaron en Caen en 2011-2012 por ebligi al mia filino Aleksandra lerni en franca lernejo, tuj Yves fariĝis denove natura partnero por biciklaj ekskursoj (foje ankaŭ kun Jean-Pierre) kaj por esperantista agado.

Yves malfermis al ni pordon de la Esperanto-mondeto en Caen, kaj mia edzino Ljuba ŝuldas al li rapidan integriĝon en la loka esperantistaro.

Iom naive mi eĉ pensis ke mi revenos al Caen kiel pensiisto, kaj diris al Yves antaŭ kelkaj jaroj, ke mi esperis pri pluaj diskutoj kaj biciklaj promenoj kiam mi estos 70-jara. Mi memoras laŭtan ridon de Yves: "Ĉu vi konscias ke mi estos 77, kiam vi estos 70?" Jes, mi konsciis pri tio, sed ni ambaŭ estis sanaj. Tiam...

Kelkfoje mi envias al kristanoj. Ekzemple nun. Unue, mi povus levi kapon al la ĉielo, kaj diri: "Yves, mi amis vin, kiel fraton kaj amikon. Mi nun ploras ke vi foriris". Due, mi ne tro malgajus, ĉar mi sciis ke tia bona homo iros rekte al paradizo. Trie, mi havus esperon ke iam, Sankta Petro lasus min trapasi la pordegon, kaj mi povus retrovi Yves. En paradizo devas esti biciklejoj kaj krespejoj, ĉu ne?

Sed bedaŭrinde, mi estas nekuracebla agnostikulo. Mi ploras kaj kompatas Anne-Marie, kun kiu Yves feliĉe vivis dum ĉiuj tiuj jaroj. Esperanto estas lingvo, sed por mi estas pli. Yves same estis pli ol esperantisto. Li inter alie estis parteto de mia vivo. Ne la plej malgrava.

Claude Rouget (Norvegio)



Yves Nicolas nous a quittés



C'est avec tristesse que nous avons appris le décès d'Yves Nicolas, survenu le 24 octobre. Espérantophone très actif, il fut

notamment responsable du club d'Hérouville-Saint-Clair, en Normandie. Rédacteur du *Bulletin normand d'espéranto*, il enseignait également l'espéranto et était correcteur pour les cours en ligne ikurso. Il a

pendant de nombreuses années organisé les tournées de conférences d'espérantistes étrangers en France.

Il nous avait présenté cette activité dans le numéro 66 de la lettre d'information *Espéranto Aktiv'*:

<https://esperanto-france.org/esperanto-aktiv-66-decouverte>

Yves naskiĝis la 29/01/1952 en Vitré (Ille-et-Vilaine)

En 1963 liaj gepatroj translokiĝis kun siaj 3 infanoj al domo sur Placo Laënnec en Caen, domo kun granda ĝardeno kiun Yves kaj Anne-Marie ekloĝis kun siaj 2 infanoj Dimitri kaj Sophie en 2007 post vivo en Hérouville de 1981 ĝis 2007.

Post la teknika altlernejo, li trapasis bakalaŭron (G1-sekretario). Li akiris statuson de konscienceca objektanto en 1972. Li estis en situacio de malobeo al la civila servo trudita per Dekreto konata kiel Dekreto de Brégançon. Proceso okazis en 1973 en Caen. Poste kun aliaj, li kreis Komitaton por la Lukto de Objektantoj kiu subtenos plurajn objektantojn ankaŭ procesitajn. Okaze de unu el tiuj procesoj li kontaktis Alphonse Barbé (sindikata CGT-aktivulo el Falaise anarki-sindikato, en 1914 en la tranĉeoj, li pafis sin en la kruron por ne militi. Post sia enhospitaligo li dizertis kaj estis procesita) por ebla atesto en tribunalo. Pro sia granda aĝo, tiu malakceptis la inviton sed sendis leteron de subteno.

Dum unu jaro li plenumis sian civilan servon kiel gastejestro de junulargastejo en Arpajon, kie li bonvenigis multajn fremdulojn kaj de tie sendube venos la ideo de universala lingvo por komuniki.

Laborinte en CAT (Helpcentro per laboro), li trapasis la konkurson de sociala helpanto, respondecis pri bonvenigado de senhejmuloj ĝis gvidado de CADA (helpcentro por azilpetantoj) ĝis emeritiĝo en 2012.

Membro de la Esperantista klubo de Caen, li kreis la klubon Hérouville-Esperanto en 1984. Li helpis en la ĝemeligo de urbo Hérouville-Saint-Clair kun Tiĥvin en 1991 kaj memkompreneble li bonvenigis la geamikojn de Tiĥvin inkluzive de Mikaelo Bronjstein.

En 1993 li organizis helpe de asocioj de Hérouville la 48-an kongreson de SAT-Amikaro.

Lia 1-a kongreso: en 1986 en Pekino kie li renkontis Dieter el Hamburgo kun kiu li restos amiko.

Post Pekino, aliaj kongresoj inkluzive de la lastaj en 2015 en Lille kaj Teherano.

Li partoprenis kaj/aŭ organizis grupajn vojaĝojn, inkluzive per biciklo. Li estis korektanto de kursoj en Interreto.

Li estis unu el la kolonoj kaj animantoj de Normanda Esperanto-Asocio. Li fariĝis redaktoro de la normanda bulteno en 2015 kaj, danke al lokaj kluboj, li starigis turismajn tagojn en la 5 normandaj departementoj. La lasta estis okazonta en Dives-sur-Mer la 15-an de oktobro 2022 sed estis nuligita pro manko de benzino ĉe multaj partoprenantoj. Kun Yves mem ni

nuligis ĉi tiun tagon.

Yves estis unu el la gvidantoj de la klubo de Hérouville, li precipe ŝatis tabulludojn, teatraĵojn. Li prizorgis la unuagradajn kursojn kun afableco kaj konfido al la junuloj, kies lernfacileco kaj efikeco li laŭdis. Li partoprenis en ĉiuj festoj de asocioj en Hérouville-Saint-Clair, en poliglota kafejoj. Dum kronvira kvaranteno, estis li, kiu ĉiumarde organizis renkontiĝojn per zoom, en kiuj partoprenis esperantistoj el Francio kaj aliloke.

De 2002 ĝis sia morto li organizis por UEA la vojaĝojn de esperantistoj, eksterlandaj aŭ ne. Ne malpli ol 59 turneoj de 2002 ĝis 2019 kaj la klubo de Hérouville akceptis multajn prelegantojn, muzikistojn...

Esperantisto, ĝardenisto, abelbredisto, tiel difinis lin lia nekrologo.

En 2014 kun la loka asocio "les Petits Carrés de Caen", li animis la pedagogian abelejon Calmette kaj helpis starigi aliajn abelejojn.

Ĝardenisto, birdkalkulanto, li eĉ semis dipsakojn por la kardeloj!

Humanisto, pacifisto, senperfortulo, 2 datoj, 2 manifestacioj markis lin: en 1973 kontraŭ la puĉo en Ĉilio kaj la lasta, en kiu li partoprenis la 22-an de februaro 2022 kontraŭ la agresmilto kontraŭ Ukrainio.

Yves mortis la 25-an de oktobro 2022 ĉirkaŭita de sia familio kaj geamikoj. Ni multe sopiras lin.

N.B: Yves havis la projekton venigi muzikiston Armel Amiot "Banĝo Esperanto"
La klubo bonvenigos Armel la 24-an de marto 2023 ĉe Café des Arts en Hérouville-Saint-Clair.

Michèle Langeois Hérouville-Espéranto
Surbaze de intervjuoj kun Anne-Marie Sibireff, lia edzino, notoj kaj arkivoj.


Tradukis **Dominik Cornice**



Anne-Marie kaj Yves en ilia ĝardeno.



Yves écrivait aussi..... en français !



Deux fois sept

Les oiseaux étaient venus et avaient tout mangé. Pour eux aussi l'hiver était vif et pinçait fort. Plus de vermisseaux sous l'écorce, plus de graines sous la mousse. Les arbres et la forêt étaient nus et n'offraient plus de garde-manger. Aussi, les miettes du Petit Poucet furent-elle une belle aubaine pour la gente ailée. Le corbeau, curieux et téméraire, mangea la première miette avant qu'elle ne touche terre. Le geai à la belle parure s'empara vivement de la seconde que lui disputa sans ménagement le pic vert. La buse et le faucon, l'épervier et la pie n'étaient pas de reste pour avaler la moindre petite croûte.

Les passereaux avaient peine à s'inviter au festin face à leurs cousins aux becs puissants et redoutables. Et pourtant, la faim tenaillait tout autant leur petit estomac. Le moineau friquet, la sitelle torchepot, le pouillot véloce, le troglodyte, le gobe-mouche, l'accenteur mouchet et le roitelet étaient aussi jolis que leurs noms et formaient d'ordinaire une joyeuse équipe qui égayait la forêt de ses chants si variés et si légers. Mais là, les sept amis n'avaient plus le cœur à chanter et leurs plumes paraissaient bien ternes. Ils allaient finir la journée le ventre creux.

Le roitelet, le plus petit d'entre eux, 6 grammes tout habillé, était aussi le plus malin. Il connaissait bien les humains pour entrer dans les maisons sans être vu, sans être entendu et avait appris leur langage. Il épiait, il observait, parfois juché sur une tête sans qu'on l'aperçoive. C'était un malin. C'était aussi un gentil et il s'était pris d'affection pour le plus petit des garçons du bûcheron. Entre petits, on se comprend.

La forêt, il la connaissait comme son nid mais aussi le château du village où le gros châtelain dormait sur ses écus et sur ses sacs de victuailles, partageant son temps entre la France et la Russie lointaine. « Saperlipopette, c'est trop bête ! » se dit le roitelet. « Nous risquons de mourir de faim, et ces sept enfants connaîtront bientôt le même sort alors que le château regorge de sacs pleins à craquer. De bons grains, des corbeilles débordantes de délicieux fromages et des jarres entières parfumées des miels les plus fameux.

Les paysans le craignent et se résignent à la plus grande des misères, y sacrifiant même leurs enfants, le sang de leur sang ! »

La colère le prit. Une colère plus grande que le plus grand chêne de la forêt, plus tumultueuse que la cascade sur les flancs de la montagne. Lui, l'oiseau si frêle et si léger que le vent en jouait volontiers, bomba le torse, gonfla ses plumes et sentit en lui une force inconnue.

La colère du roitelet lui donnait du courage et décuplait son intelligence. Il savait un tunnel secret qui menait au cœur du château sans être vu, puis un escalier en colimaçon qui menait au plus haut des plus hauts des greniers, là où le gros méchant homme enfermait ses réserves. Il l'avait vu cacher la clé de la grosse porte de bois dans un vieux sabot faussement abandonné dans le couloir, mais cette clé était trop lourde pour son petit bec et pour celui de ses six amis, même réunis dans un même effort. Comment faire ?

Il voleta doucement jusqu'au Petit Poucet monté au faite d'un arbre pour chercher son chemin et lui dit : « Regarde vers le soleil couchant, Petit Poucet. Derrière la plus éloignée des collines se cache le château du village. Nous y trouverons toute la nourriture de la contrée volée à tes parents et à tous tes frères humains. Je connais le chemin et si tu m'aides, et si je t'aide, nous mangerons bientôt à satiété et nous distribuerons les réserves aux hommes et aux bêtes. Tous se soulèveront et chasseront le châtelain bien loin, bien loin, au-delà même de Vladivostok ! »

Le roitelet se percha sur l'épaule droite du Petit Poucet pour le guider, et les six autres passereaux firent de même sur l'épaule droite de chacun des six autres enfants. On entendit alors dans la sombre forêt s'élever un joyeux gazouillis qui signifiait « à droite », « à gauche », « tout droit » et sept enfants aller en chantant d'un pas léger.

Dans quelques heures, le soleil éclairerait le monde d'un jour nouveau.

Atelier d'écriture 2012/2013

Le Petit Poucet revu et corrigé

suite après : « Les oiseaux étaient venus et avaient tout mangé... »

par : **Yves Nicolas**

Fungoj (2)

Kelkajn tagojn antaŭ sia forpaso, ĉar pro sia malsano, li ne plu povis skribi, Yves lasis en mian telefonon, voĉan mesaĝon por kompati pro la morto de mia bopatro. Ĉar mi sciis pri la graveco de lia malsano, tiu gesto esti plej kortuŝa, montrante ke Yves pensis pri aliuloj antaŭ ol pri si mem. Kelkajn tagojn antaŭe, mi sendis al Yves mesaĝon pri la plej taŭga dato por sendi la artikolon kiun vi estas legonta.

Nia kuraĝa, bonkora, bonvolema amiko, restos ĉiam en nia koro.

Parto 2

Amikoj, malamikoj ?

Ni vidis, en la lasta artikolo ke fungoj bezonas substraton en kiu kreski. Tiu substrato povas esti senviva (roko, morta ligno) aŭ viva (plantoj, arboj, bestoj (inkluzive de homoj !)

En tiu eta prezento, temos pri la rilato de fungoj al vivaj kreskaĵoj, precipe arboj.

Ni, esperantistoj estas optimistaj, ĉu ne ? Do ni komencos per la malamikoj kaj finos per la pozitivaj aspektoj, (teroformado kaj nutriga reto).

Vivaj arboj enhavas ene de sia ligno, partojn kie amasiĝas rezervoj de sukeroj (precipe amelo). Tiun stokon kelkaj fungoj ŝatus profiti, sed kiel eniri ? (ligno estas bone protektata de aktiva ŝelo).

Unu rimedo estas eniri tra la radiketoj de la arbo. Por tion fari la fungo detruas la ŝelan protekton de la radiketo kaj plukreskas sub la ŝelo de la arbo (se tiu arbo estas malforta kaj ne povas defendi sin per produktado de kemiaĵoj kontraŭfungaj). Kiam la hifoj trovas la stokon de amelo : ek por la festeno !



Armillaria mellea

Ĉiam je la bazo de malfortaj arboj.

La disvastigado povas mortigi la arbojn.

Tre danĝera fungo, ĉar tiu parazito povas disvastiĝi al aliaj proksimaj viktimoj per la interkonekto de radikoj.



Alia rimedo konsistas en profiti de vundoj (ŝirita ŝelo, rompita branĉo) por ke la sporoj portataj per aero, eniru sub la ŝelon. Tiuj fungoj ankoraŭ bezonas adekvatajn enzimojn, por kontraŭstari la memdefendajn kapablojn de la arbo.

Ĝenerale la parazitoj komencas per digestado de la mortaj ĉelaroj kaj poste, sufiĉe fortaj, ili atakas la vivajn ĉelarojn (danke al tiuj enzimoj).

Tiel agas la tindrofungo (*Fomes fomentarius*)

Nun, jen malpli agresemaj fungoj kaj eĉ utilaj por la arbara medio : la saprofitaj fungoj.

Ĉi tiuj nutras sin per digestado de mortaj ĉelaroj (morta ligno)

Ili estas tre utilaj por senigi mortajn branĉojn el la branĉaro de arbo. Iasence, ili rolas kiel kirurgoj por arboj.

Sen ili, amasoj da morta ligno amasiĝus sur la arbara grundo. Des pli, la digestado de morta ligno estas la fonto de vegetala grundo, en kiu la arboj povos trovi nutraĵojn.





Pluteus cervinus

Tre efika por transformi sapron (morta ligno) en vegetan grundon.

Pleurotus ostreatus

Tiu fungo povas facile esti kultivata sur medio el pajlo



Por fini, mi prezentu al vi la verajn amikojn de arboj, nome la mikorizaj fungoj.

Ili produktas mikorizojn kiuj estas iaj specifaj hifoj kiuj volviĝas ĉirkaŭ la radiketoj de iu arbo.

Ĉe tiu loko, la mikorizoj povas sorbi la sukerhavan sukron (sevo) ellasitan de la arbo.

Ankaŭ la arbo profitas la asocion. Danke al la maldikeco de la hifoj, la fungo kiu formis mikorizojn, povas kapti akvon kaj mineralojn multe pli efike ol la (relative) dikaj radiketoj de la arbo.

Jen bona ekzemplo de interspeca kunlaboro !

Ofte, mikorizaj fungoj estas specifaj de iuj arboj.

Ekz : ***Russula fageticola*** preferas fagojn



Lactarius pyrogalus estas specifa de avelarboj

Rémi TROISGROS (50)



" Esperanto kaj greeter organizo" , novaj partneroj ?

En Le Havre, Sylvie iĝis membro de fervoraj gastamaj Havranoj, kontakteblaj per **www.greeters-lehavre.com**

Tial jam eksterlandaj samideanoj vizitis Havron kaj ŝi proponis al ili postpromenadan amikan renkonton al esperantistoj.

Jen rimedo konatiĝi kaj interŝanĝi pri niaj kulturoj.

Ĝis revido Mourad (Turkio), Rosanella kaj Lucia (Britio) !

Bonvenon iam ajn, karaj amikoj !

Patrice Dufeu et Sylvie Caron (76)



DOSIERO BIKIKLADO (4)



Somere, biciklante al Danujo tra Esperantujo

Ni ne plenumis nian planitan bicikladon laŭ Danubo, nek en 2020, nek en 2021, pro la pandemio. Ankoraŭ ĉi-somere, pro la milito, ni prokrastis la projekton.

Sulina, nia celita urbo, situas rande de la Nigra Maro, ĉe la dekstra bordo de la riverego kies delto dislimas Rumanion kaj Ukrainion. Tiu regiono – ĉirkaŭ 300 kilometrojn sude de Odeso – estis tiam sufiĉe trankvila kaj sekura, sed multaj homoj fuĝis de la milito kaj ŝirmis sin tie. Ni ne povis senrespekte, kiel turistoj, uzi por nia propra plezuro la loĝistikajn rimedojn, de kiuj dependas ilia supervivo.

Ĉar la vojo al la oriento estis pro tio neebla, ni decidis ŝanĝi unu literon, nur unu. « J » anstataŭigis « B » : ni

ne iros al Danubo sed al Danujo.

Tie, Pia – kun kiu ni jam renkontiĝis sed nur rete kadre de la Esperanto-kursoj de la Londona Klubo – afable proponis bonvenigi nin.

Ni surseliĝis fine de majo kaj revenis hejmen cent tagojn poste, biciklante pli ol kvin mil kilometrojn.

Ni sekvis norden la marbordojn de la Manika Markolo kaj de la Norda Maro, de Francujo al Danujo, laŭ Belgujo, Nederlando kaj Germanujo, ĝis la mirinda loko Grenen, kie la furioza Norda Maro kaj la trankvila Baltika Maro renkontiĝas.

Poste, ni direktiĝis suden, en trajniĝis en Odense al Kopenhago – nur la biciklistoj de la Tour de France rajtas uzi la ponton bicikle –, kaj revenis hejmen tra Germanujo kaj Belgio. Alveninte en Francujo, ni veturis laŭ la rivero Somme ĝis Amiens. Tie, pro malbona vetero, ni decidis mallongigi la vojaĝon kaj reveni trajne al Caen.

Kompreneble, ni vidis belegajn pejzaĝojn, precipe biciklante laŭ la Vadmaro.

Sed... « Kiel la afero rilatas al Esperanto ? », vi diru.

Survoje, ni plezure renkontis multajn Esperantistojn.

Danke al la Pasporta Servo, ni estis amike gastigitaj de esperantistoj okaze de 16 el niaj 84 etapoj, en ĉiuj landoj.

Ankaŭ esperanto-klubojn ni vizitis en Antverpeno kaj Hamburgo, kie mi prelegis pri nia vojaĝo.

Survoje, ni ankaŭ renkontis Lars Sözüer. Li, kun du aliaj membroj de BEMI, estis biciklantaj al la Internacia Junulara Kongreso, kiu okazis ĉi-somere en Nederlando. Li aranĝis sian itineron tiel, ke ni renkontiĝu. Kvin esperantistoj el kvar landoj tiel veturis kune dum unu komuna etapo.

Kelkfoje, gastigantoj invitis aliajn najbarajn esperantistojn, por ke ni kune manĝu.

Tiel ni renkontis kvardekon da esperantistoj... kiuj fariĝis niaj novaj amikoj.

Ni esperas, ke kelkaj el ili vizitos nin siavice en Normandio.

Verdire, estis la unua fojo, kiam ni uzis la internacian lingvon eksterlande. Estis la unua fojo, kiam ni devis nepre uzi Esperanton, ĉar ni havis neniun komunan lingvon. La vojaĝo estis do bonega okazo por pliigi nian parolnivelon.

Venontan someron, se la milito estus finita kaj, finfine eblus bicikli al Rumanujo kaj al la Nigra Maro. Sed mi timas, la paco ankoraŭ ne regos tiam.



Ni do planas alian vojaĝon ; ni kaj niaj karaj bicikloj veturos buse al Streĉin (Slovakio) ; ni partoprenos en la Somera Esperanto-Studado kaj pedalos reen hejmen.
Ni ne kontrolos ĉu la Nigra Maro estas vere tielkolora sed, inter Bratislava kaj Donauworth, ni sekvos la danuban riverbordon kaj almenaŭ povos kontroli ĉu ĝi estas blua – tion diris Johann Strauss – aŭ flava – tion diris Jules Verne –, Claudio Magris diris griza.

Reveninte, finaŭguste, ni sciigos al vi la veron.
Pli grava estas, ke Esperanto ankoraŭ estos nia pasporto al amikiĝo !

Pri nia biciklado, ni verkis blogon, kiun vi povas legi ĉi-tie : <https://cutt.ly/TraEsperantujo>

Bertrand et Véronique Verstraede (14)

Yves, I-grekEn,...

un des phares d'Hérouville-Esperanto,
1er contact écrit dès l'été 1995, après mon
apprentissage avec Dennis Keefe
(2 semaines au château de Grésillon),
suivi de tant de visites des mardis soirs, des
réunions, des conférences, des
samedis touristiques, des stages à la maison
des associations où tu étais le
serveur du restau'(avec tablier et torchon sur le
bras)..., un rapide bonsoir au
congrès SAT de Madrid (en route vers un
mariage)...

Yves, fédérateur d' énergies.

quel trop bref compagnonnage si riche en
« espérantie »...

quel guide tu as été dans notre association
Esperanto-Normandie...

quel curieux et fouineur d'archives que tu as su
partager,

quel « encourageur » permettant le
dépassement d'un(e) réservé(e),

quel relecteur bienveillant
(ou impitoyable «
condenseur » de verbiage
transformant un rapport
maladroit en sa

« substantifique moëlle » !)
quel accompagnant délicat et attentionné aux
invités « d'ailleurs » lors des
rencontres dont tu organises le circuit français...
quel être lumineux, regonflant le moral
vacillant...

épaulant l'ami(e) éprouvé(e)...
disant, au cours de ce qui sera notre dernier
entretien téléphonique,
combien ta vie est belle... malgré les moments
difficiles présents...
étoile tu resteras...

Anne Marie Leprévost (Flers-de-l'Orne)



A.G
de l' Association
Normande en juin
2018
à
L' Aigle (61)

Adiaŭ Alano

Fervora samideano kaj havra amiko forpasis fine de aŭgusto. Alain Chalm estis nia plejaĝa klubano, fidela de post 50 jaroj.

Unue, nia amiko havis tempovoran profesion estiel juvelisto. Li ankoraŭ ne aliĝis nian klubon sed Esperanto jam ravis lin per radioelsendoj esperantolingvaj, kiujn li kutime aŭskultis dum la juvelkreado. Paralele, li studis helpe de manlibro.

Dum postaj jaroj, li iĝis fervora klubano, faciligante rilatojn kun kulturdomo kun kiu ni organizis ekspoziciojn per tutmonda salutkorespondado.

Kadre de vespera kursaro de Unuiĝo de Lernintoj de loka liceo, li ebligis starigon de kurso de Esperanto. Li eĉ uzis interreton por informi pri sia profesio kaj okaze konferencis pri ĝi. Nostalgie ni povus atesti pri lia parollerteco dum esperantokunvenoj kaj pri lia entuziasmo dum la Centjariĝa Kongreso en Varsovio : « grala » travivaĵo por li.

Kun Amiko Ivo, ili restos inspirdonaj ekzemploj. Jam vizitante Havron, retrovu belverkon de Alano : li kreis la tabernaklan pordeton en kirko Sankta Jozefo.



Maldekstre, Alain Chalm kun Zef (61) dum la Ĝ.A en Monttivilers en 2016

Sylvie Caron et Patrice Dufeu (76)

Fariĝi libervola hundopromenisto ĉe SPA (Bestoprotekta Societo)

Mi ne povas adopti hundon, mi jam havas katon hejme.

Post kelkaj horoj da trejnado por lerni la protokolon, mi fariĝis hundopromenistino en la rifuĝejo. Mi aĉetis botojn ĉar troviĝas multe da koto en kelkaj lokoj post la pluvo. Ĉiutage disponeblas listo de promeneblaj hundoj. Oni devas skribi sian nomon sur la tabelo en la kolumnoj kiuj korespondas al la hundoj kiujn ni promenos.

Oni devas preni ŝnuron aŭ jungilaron por la plej grandaj hundoj kaj ankaŭ saketojn por levpreni la fekaĵojn, se necese. Tio malpli amuzas min.

Ĉiu promenado en la parko de la rifuĝejo daŭras ĉirkaŭ duonhoron.

Oni ankaŭ povas konduki la hundojn dum kelka tempo en grandan ĉirkaŭbaritejon kie ili povos libere kuri kaj ludi per ludiloj. Ĝenerale la promenado bone okazas.



La hundoj multe bojas kiam oni staras antaŭ la kaĝo. Ili, malpacience, deziras eliri kaj feliĉas kiam ili estas ekstere.

La plej spertaj kutimuloj prizorgas pri la plej nedirekteblaj hundoj. Mi iras al la rifuĝejo unu aŭ du fojojn semajne dum ĉirkaŭ

tri horoj.

Mi rimarkis, ke preskaŭ ĉiusemajne foriris hundoj. Ili estis adoptitaj dum aliaj alvenis. Pasintan fojon, mi promenis kun plurajn hundojn. Inter ili tiu afabla kaj trankvila buldoko videbla sur la foto.

Véronique Charles (14)



Ĝardenisto





Yves
Abelbredisto.



Esperantisto



Kiel doganisto 2016



1999, Yves et Claude
devant le croiseur
"Aurore", Saint
Petersbourg.




Turisma tago en Carentan
Kelkaj membroj de la estraro de la
asocio 2019



Exposition photos
Tziganes de Roumanie
avec Catherine
Nicolas-Gautier,
photographe, et Rodica
Todor
2012



2018, café polyglotte HSC



Yves et Anne-Marie akceptis nombrajn
esperantistojn, ĉi tie japanajn amikinojn, S-ino Aida
kaj Akemi